

# esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 1 / 2013



Bonaĵo Jarom  
al ĉiuj!

## Saluton Kara Legantaro !



Ni esperas ke vi pasigis ĝojajn festojn. NR estis mirinda kaj sukcesega kun multaj vivĝuemuloj ludemaj kaj artistaj ! Ŝajnas ke la etoso en Greziljono ankaŭ varmis (dankon Paŭlo pro liaj fotoj). Ni atendas senpacience viajn komentojn kaj fotojn de JES, NR kaj de la aliaj renkontiĝoj !

Jen nova starto kaj la momento renovigi **viajn kotizojn** kiujn helpegas la klubon EBG ! Atentu, la kotiz-prezroj iome altigas ekde tiu monato (p. 4). En tiu ĉi *Aktuala*, vi legos artikolon de Liba kiun ni ne havis la eblecon publikigi antaŭe. Ni profitas la okazon por gratuli ŝin pro ŝiaj regulaj (kaj interesaj) artikoloj.

Ni agnosku ke dank' al Liba, ni malkovris la blogon de José Antonio (Toño) del Barrio, Prezidanto de HEF (*Hispana E-Federacio - Aktuala 5 /2012, p. 18*). Antaŭ pluraj jaroj, li skribis trafan artikoleon pri la **pluraleco** de la internacia lingva movado (p. 5). Ankaŭ, ni aldonis plian nunan artikolon de nia «samideano» Tonjo !

Tiujare, ne maltrafu la faman muzik-festivalon «**FESTO**» kiu okazos en Aŭgusto en Belgio (Kelmis) : «Reveno al Amikejo». Pliaj informoj ĉe [festoj.jefo.fr](http://festoj.jefo.fr)

Eĉ se ĝi certe ne sufiĉos por haltigi la ekonomio-socian katastrofon, **2013** estu la *Jaro de la Kreado kaj de la Amo*, ... post la «*Fino de la Mondo*» ! Do, ...

*Bonan Jaron kaj ...Bonan Amon !!!*

Laur' kaj Samy  
[aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org)



## Enhavo

|                |                           |
|----------------|---------------------------|
| Paĝo 3 :       | Eventoj                   |
| Paĝo 4 :       | Kotiz-tabelo              |
| Paĝo 5 :       | La Pluraleco de Esperanto |
| Paĝo 6 - 7 :   | El Burgos al la Mondo     |
| Paĝo 8 :       | Songlines                 |
| Paĝo 9 - 10 :  | Vojaĝo per biciklo        |
| Paĝo 11 - 12 : | Esperantisto de la Jaro   |
| Paĝo 13 - 15 : | Itala Kongreso 2012       |
| Paĝo 16 :      | Plano B                   |
| Paĝo 17 - 18 : | Esperanto-ĥoro            |
| Paĝo 19 - 20 : | Fotoj                     |



## K O L O F O N O

37a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : [aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org) ;  
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

**Prezidanto** : Angelos Tsirimokos ; [prezidanto@esperantobruselo.org](mailto:prezidanto@esperantobruselo.org) ; **Kasisto** : Jan Amadori [jan.amadori@gmail.com](mailto:jan.amadori@gmail.com)

**Sekretario** : Laurent Loisse : [sekretario@esperantobruselo.org](mailto:sekretario@esperantobruselo.org) ,

**Abona membriĝo** : 10 eŭroj jare, konto **IBAN** : BE64 0000 1230 4852, **BIC** : BPOTBEB1 de la Esperantista Brusela Grupo

**Kunvenejo** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝkesto, nek telefono . **Informoj** : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



## A G E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)

## J a n u a r o

URĜE

**EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,**  
bonvolu kontakti [nikolao@esperantobruselo.org](mailto:nikolao@esperantobruselo.org) aŭ vespere 0478 382 981

Merkredon la 23an 18:30-20:00 Semajna kunveno / kursoj

Merkredon la 30an 18:30-20:00 Semajna kunveno / kursoj

## Februaro

Sabaton la 2an 12:45 - 14:30 **Eskapadoj en Bruselo : Vizito de Bierfarejo**  
kaj iom poste kun Esperantaj komentoj **aliĝu antaŭ la 26a de Januaro**  
16:30 - 21:30 **kontakto Miŝel mlaitat-ĉe-yahoo.fr aŭ 0486 969 214**  
**Esperanto-Kafejo en Taverno Greenwich**, Rue  
des Chartreux 7 Kartuizersstraat - 1000 Bruselo  
**Informoj** : <http://cafe-eo-bxl.weebly.com/>

Merkredon la 6an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno / Kursoj

Merkredon la 13an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno

Merkredon la 20an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno / Kursoj

Merkredon la 27an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno / Kursoj

## Marto

Merkredon la 6an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno / Kursoj

Merkredon la 13an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno / Kursoj

Merkredon la 20an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno / Kursoj

Merkredon la 30an 18:30 - 20:00 Semajna kunveno / Kursoj



Vidita en Rio de Janeiro (Brazilo) dum la monato de Decembro 2012.





## KOTIZ-TABELO 2013

**Bonvolu laŭ eble rekotizi nun! Notu ke EBG ŝanĝis sian bankkonton => Vidu sub la tabelon**  
Kotizoj al FEL/APE/UEA normale ne estos perataj post la fino de februaro!

| Nro                                      | Kodo   | Kategorio                                    | Kotizo (€) | Rajtoj   |
|--|--------|--|------------|--|
| <b>ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO</b>        |        |  |            |  |
| 11                                       | MEM    | Membro de EBG                                | 10         | } Reta "Aktuala"<br>{ (dumonata organo de EBG) +<br>} partopreno en la vivon de la Grupo |
| 12                                       | MEM-R  | Membro - junulo (ĝis 26-jara)                | 5          |  |
| 13                                       | MEM-S  | Membro - pensiulo, senlaborulo               | 7          |  |
| 14                                       | FAK    | Familia kunloĝanto                           | 2          | partopreno en la vivon de la Grupo   |
| 18                                       | DVM    | Dumviva membro de EBG                        | 250        | Membreco kaj presita "Aktuala" dum la tuta vivo (25x MEM kotizo)                         |
| 19                                       | PAK    | Presita AKTUALA                              | 3          | Krompago por daŭre ricevi presitan version de Aktuala                                    |
| 20                                       | PAK-E  | Presita AKTUALA ekster Belgio                | 6          | Krompago por daŭre ricevi presitan version de Aktuala ekster Belgio                      |
| <b>BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ</b> |        |  |            |  |
| 22                                       | FEL    | Membro de la FEL Flandra Esperanto-Ligo      | 25         | Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)                                      |
| 25                                       | APE-M  | Membro de APE Asocio Por Esperanto"          | 25         | Kun abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)                                   |
| 26                                       | APE-SM | Subtena membro de APE "Asocio Por Esperanto" | ekde 30    | Kun abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)                                   |
| 27                                       | EeM    | Nur abono al la revuo "Esperanto en Marche"  | 16         | Nur abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)                                   |
| <b>UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO</b>       |        |  |            |  |
| 31                                       | SA     | Simpla abonanto de "Esperanto"               | 38         | Abono al "Esperanto", la monata organo de UEA  |
| 32                                       | Kto    | Simpla abonanto de "Kontakto"                | 23         | Abono al "Kontakto", la junulara revuo de UEA  |
| 33                                       | MJ     | Membro de UEA kun "Jarlibro"                 | 25         | Membreco en UEA + "Jarlibro"   |
| 34                                       | MA     | Membro-abonanto de UEA                       | 61         | MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !   |
| 35                                       | MG     | Membro de UEA kun "Gvidlibro"                | 10         | Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)                             |
| 36                                       | SZ     | Membro de Societo Zamenhof                   | 122        | Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA                                   |
| 37                                       | MD     | Dumviva Membro de UEA                        | 1.525      | MA de UEA dum la tuta vivo!  |

**NOTOJ:**

Pagu al la bankkonto **IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC : TRIOBEBB** de la **Esperantista Brusela Grupo**

Por efike subteni nian agadon, estas konsilinde membriĝi ankaŭ siajn familianojn, se ili ne kontraŭas Esperanton !

EBG peras kotizojn al APE, FEL au UEA **nur por siaj propraj membroj !**

Nepre indiku la celon de via pago per literaj [aŭ, se vi ĝiras elektronike, ciferaj] kodoj, ekz. "MEM+APE" aŭ "11 21"

La JARLIBRO de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj.

La GVIDLIBRO de UEA enhavas la samajn informojn, sed sen la adresoj.

# La Pluraleco de Esperanto

Dum la lastaj semajnoj mi trovis kelkajn novajn okazojn en kiuj diversaj esperantistoj plendis pri la sintenoj de siaj samideanoj... ĝuste ĉar ili ne estis **samideanoj**.

Tio estas, ili surpriziĝis ĉar ili trovis ke kelkaj, multaj aŭ eĉ la plejmulto de la partoprenantoj de la movado ne aliras la lingvon pro la samaj kialoj kiel ili.

Jen unu nomas sin *disidento*, alia forlasas retforumojn, alia ĉesas entute aktivi en la movado (kompreneble, mi rifuzas nomi tion *kabei*, <http://www.liberafolio.org/2005/Komentario/tonyokomentario> ).

Mi deziras argumenti ke la problemo ne estas la ceteraj movadanoj, sed ĝuste oniaj antaŭsupozoj pri Esperanto kaj la esperantistoj. Kaj mi deziras fari alvokon por ke en informado ni antaŭavertu la interesatojn pri la granda pluraleco de nia movado.

Estas bone antaŭinformi ke tiu aliranta nian lingvon pro universalismaj elanoj trovos ankaŭ naciistojn, kiu uzas Esperanton por ne paroli alian lingvon kiun ili konsideras subpremas ilian lingvon. Kiu konsideros ke Esperanto povas helpi savi minoritatajn lingvojn, malkovros ke kelkaj esperantistoj ne rifuzas konsideri la dezirantecon de unulingva mondo. Kiu supozas ke la esperantistoj estas idealistoj kun grandaj sociaj projektoj, rimarkos ke multaj konsideras Esperanton amuza hobia, aŭ maniero trovi sociajn kontaktojn, aŭ eĉ ŝanco vojaĝi malaltkoste. Kiu estas



fervorulo de la lingvoj notos ke aliaj konsideras Esperanton socia fenomeno, kaj neniel interesiĝas pri filologiaj aferoj. Kiu esperu trovi progresemojn, renkontos ankaŭ multajn konservativulojn, dum liberaluloj vidos multajn anarĥiistojn. Kaj fine, kiu esperos renkonti homojn kun strebo al komunikado kaj al interhomaj rilatoj, malkovros kverelemulojn kaj plendulojn.

Estas do bone ke estontaj esperantistoj ne tro faru al si iluziojn pri la karaktero de la movado. Eble per tia averto ni povas perdi lernantojn, sed aliflanke, tio havas du avantaĝojn. Unu, almenaŭ ni sukcesos reteni pli grandan proporcion de tiuj kiuj donos la definitivan paŝon. Aliflanke, tio permesas montri ke la kialoj por lerni Esperanton estas sufiĉe diversaj por ke ĉiu homo povos trovi sian propran motivon.

Kaj ke estas loko por ĉiuj en nia movado.

*José Antonio del Barrio, 29.08.2005*

<http://www.delbarrio.eu/2005/08/la-pluraleco-de-esperanto.htm>



# El *Burgoso* al la mondo



Kiel mi anoncis (...), la liberecanaj rondoj plu moviĝas rilate al Esperanto. Kaj tre, la iniciatoj povas forte kreski dum venontaj monatoj. Nome, la sekcio de la sindikato CGT en Burgoso organizis dum tiu ĉi pasinta semajno serion da konferencoj pri nia lingvo, kiu akompanis de nun vojaĝontan al aliaj urboj de, aŭ *Ĝenerala Konfederacio de la Laboro*, estas minoritata hispania indikato, kiu devenas el la anarĥiista tradicio. Fakte, ĝi formiĝis post splitiĝo disde la pli tradicia CNT (Nacia Konfederacia de la Laboro), baze ĉar la CGT partoprenas la sindikatajn balotojn

ene de la entreprenoj. Ambaŭ tre rilatas al Esperanto, kaj ne malofte publikigas artikolojn en siaj revuoj. CGT havas konstantan rubrikon en aŭ pri Esperanto en sia reta revuo "Ruĝa kaj Nigra", ĝia katalunia sekcio aprobis antaŭ du jaroj klaran rezolucion favore al nia lingvo, kaj antaŭ kelkaj tagoj ĝi pretigis eĉ esperantan version de la video eksplikanta la kialojn por la ĝenerala striko kunvokita por

venonta merkredo en Hispanio (*bv tajpi «respira ver.esperanto» ĉe youtube -NdIR*).

<http://www.youtube.com/watch?v=oTZpY3ghzoA>



La ekspozicio nun inaŭgurata enskribiĝas en serio pri *la kulturoj de la libereco en la iberia anarĥiismo*. La unua tia ekspozicio estis pretigita antaŭ tri aŭ kvar jaroj, temis pri liberecanaj pedagogioj, kaj ĝuis bonan sukceson en tiu medio.

La nuna pri Esperanto konsistas el dudek paneloj, homaltaj kaj plenaj je informoj, pri la lingvo mem, pri la historio, la anarĥiisma kaj ĝenerale laborista tradicio, kaj pri la uzo de la lingvo fare de la povo kaj la potenculoj. Ĝi kompreneble videbligas ideologian vidpunkton, sed entute ĝi estas sufiĉe interesa por la ĝenerala publiko, ne

nepre anarĥiisma. Ankaŭ la katalogo (*trovevebla ĉe <http://www.cgtburgos.org/> - NdIR*) estas ege bonkvalita.

La tuton pretigis tre interesa kaj promesplena grupo de esperantemaj anoj (ĉe «Ipernity - NdIR») de la sindikato en Burgoso (*Burgos*, la iama ĉefurbo de la malnova Kastilio, kulture alloga urbo, trairata de la Jakoba Vojo). Kelkaj el ili jam organizis atelieron por lerni nian lingvon, sed ilia nivelo estis ĝis nun modesta. Certe tiu ĉi iniciato taŭgos por firmigi la grupon kaj la agadon en tiu urbo.

Kiel dirite, krom la ekspozicion, ili organizis serion de konferencoj dum la tuta semajno. Ĝi ĝuis bonan partoprenon kaj intereson. Mi mem partoprenis la vendredan fermon per prelego pri la nuno kaj estonto de la lingvo. Mi provis malmunti diversajn mitojn





pri Esperanto, kaj montri al la publiko ke temas pri tute vivanta lingvo kaj movado, eĉ se por multaj tio ne evidentas.

Mi ankaŭ substrekis la pluralecon de la komunumo. Mi tion provas fari ofte, (*bv legi p. 5 - NdIR*) sed ankaŭ en personaj prezentadoj. Multaj homoj en Hispanio suferas la antaŭjuĝon ke Esperanto estas afero de anarĥiistoj, aŭ ĝenerale de maldekstruloj, aŭ ili pensas pri homoj engaĝitaj al novaj sociaj movadoj.



Tio povas altiri multajn, sed ankaŭ limigi la varbadon, kaj ĉefe oni riskas ke tiuj estontaj esperantistoj seniluziiĝu kiam ili trovas ke ne nepre la jamaj movadoj kundividas iliajn proprajn vidpunktojn.

Fakte, tio ĵus dramece okazis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam la grupo atinginta tiun notindan sukceson en TED, pri kiu mi rakontis antaŭnelonge, post serio da miskomprenoj kun loka grupo, ŝajne

abrupte forlasis nian lingvon kaj eĉ ekkreas sian propran.

Tial, mi preferis tion substreki ankaŭ en mia prezentado antaŭ liberecanoj, eble eĉ insiste, por ke neniu ricevu ŝokon ĉe konstato pri la reala Esperantujo.

Kiel dirite, la agado de la sindikato ne finiĝas tie ĉi.

La ekspozicio baldaŭ ekvojaĝos. Eble en iuj lokoj oni povos ankaŭ komplementi per simila prelegado, je kiu mi esperas ke HEF kaj la ceteraj asocioj povos kontribui.



Se al tio aldoniĝas la baldaŭa okazigo de la SAT-kongreso en Madrido, eble ĉio povas konspiri por ke la liberecanaj rondoj, eĉ se nun pli minoritataj, reprenu la ligitecon al Esperanto, iam karakterizintan tiun movadon.

José Antonio del Barrio  
<http://www.delbarrio.eu/blo/2012>



## SONGLINES (Nuit Blanche 6/10/2012, ...): Odo al BRUSELO, ĝiaj LOĜANTOJ kaj BREL

Bruselo estas ja ia nuntempa Bjalistoko, lingve kaj kulture, ĉar tie havas sian sidejon multaj internaciaj entreprenoj kaj premgrupoj kaj okazas febra diplomatia agado pro apudeco de la EU-instancoj.

Krom tio, tamen, ĝi estas ankaŭ la hejmurbo de la mondfamakantisto **Jacques Brel**, kies kanzonojn centoj da kantistoj tra la mondo kantis.

'Songlines' estas projekto de la artista kolektivo "Het Pakt" [1] kiu, kunlabore kun la urbo Bruselo kaj la migrantocentro Foyer, akompanis kvindkekon da bruselaj **enloĝantoj** de la plej diversaj originoj por surbendigi en iliaj respektivaj gepatraj lingvoj unu el la plej konataj kanzonoj de Brel, nome 'Ne me quitte pas' (Ne forlasu min).



La voĉoj estis surbendigitaj dise kaj poste specimenigitaj ('sampled') al virtuale moviĝanta multlingva koruso, akompanata de poezia projekciado grandekrana de la portretoj de ĉiuj personoj kiuj kunkantis.

Tiu kanzono jam estis tradukita afrikansen, anglen, araben, finnen, germanen, hebrean, hispanen, italen, katalunen, kroatan, nederlanden, polen, portugalen, rusen, turken kaj sveden. Kial ne aŭdigi la kaŝitanlingvan diversecon kiu ekzistas malantaŭ la oficiala lingva statuso de **Bruselo**?

Do tempo por kunkantada ekzerco !

Inter la lingvoj kiuj aŭdeblis troviĝis i.a. jenaj lingvoj : franca, nederlanda, greka, angla, araba, turka, hispana, kataluna, afrikansa, portugala, korata, rusa, itala, sveda.

Temis ne pri spertaj kantist(in)oj, sed ekzemple pri novalvenintoj el Bulgario, el diversaj afrikaj landoj aŭ el Ĉinio -- partoprenis ankaŭ junaj ciganoj, kiuj kantis en la romaa lingvo. Ne estas informo pri iu kiu kantis en Esperanto.

[1] <http://www.hetpakt.com/homepage%20lieven/homepage.html>


(Fonto : Foyer, tr. H.Deceuninck)





# Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'

19/09/2008  
- 01/10/2008



## Francio

▷ Post pluraj suprendeklivoj ni fine ĝuas nian unuan vidon al la maro Mediteraneo, post preskaŭ 1000 km da ŝvitado. Mallonge poste, la Pirenean montaron ni ekvidos, kiel pruvon ke proksimiĝas la celo.

En eta vilaĝo, iu loĝanto informas nin, ke nur la stadiono ebligus al ni starigi la tendon. Bedaŭrinde, okazas vespera rugbea trejnado ĝis la deka horo. Ni ĉagrenite decidas plubicikli, ne sciante, kie ni tendumos en tiu malaltmontara regiono kun nur vinberujaj aŭ ŝtonecaj kampoj ĉie ĉirkaŭe.

Jam noktas kaj ni lacas. En suprendeklivo ni finfine ekvidas domon. Ni eniras la bienon kaj antaŭ ol ni havas tempon sonori, iu virino 80-jara malfermas la pordon.

Ŝi konsentas, ke ni instalu nian tendon sub antaŭtegmento de ŝia hejmo. Ŝi ankaŭ proponas, ke ni duŝiĝu kaj uzu la necesejon. Ŝi eĉ preparas bongustan supon por ni. Ŝi nomiĝas Luce. Kiam ŝi estis pli juna kaj ankoraŭ vivis ŝia edzo, ŝi multe piedmigris kun dorsosako. Multe plaĉas al ŝi renkonti vojaĝantojn per biciklo. Ŝi eĉ informas nin, ke ŝi ne ŝlosos sian hejman pordon por se okaze ni nokte bezonos necesejumi.

Ŝi nur demandas al ni, ĉu ni ne intencas murdigi ŝin dum la nokto. Ni pripensas la aferon momente kaj ni respondas, ke ni

jam murdigis sufiĉe da maljunulinoj dumvoje kaj ni ci-foje preferus dormi.





Forte blovas la vento dum la tuta nokto kaj ni iomete timas por la morgaŭa biciklado. Luce matene ellitiĝas pli frue ol kutime por reparaĵoj al ni kaj adiaŭi nin.



Jam de la tagmezo Roz' provadas kontakti sian patron, en Narbono, sed li ne ŝaltis sian poŝtelefonon.

Nur vespere, kiam ni atingas la enirejon de Narbono, ŝi fine trafas lin. Li ne aĉetis manĝaĵojn, ĉar li kredis nian alvenon nur la morgaŭon. Butikumo por la vespera manĝado faras nin alveni dum jam noktas.

Fine, ni alvenis,... alvenis je la startloko de nia tramonda vojaĝo, venontjare.



Turniroj de surbarkaj luktantoj okazantaj ĉiujare en la proksima urbo Seto. Kiu unuavice sukcesos faliĝi kanalen la kontaŭbatalanton ?



Perpinjano : Eksa urba pordego

Ĝis Perpinjano kaj poste ĝis la maro, la vento helpas nin. Ni apenaŭ rimarkas ĝin, escepte foje en suprendeklivoj, kiam ĝi puŝas nin kaj ni apenaŭ bezonas pedali. Sed poste, ni direktiĝas norde al Narbono laŭ la maro. Tiam, la vento abrupte rememorigas al ni sian ĉeeston, venante de fronte aŭ, eĉ pli terure, de flanke. Ĝi plurfoje danĝere flankenpuŝas nin dum la trafiko iom multas kaj rapidas. Post 30 tiaj kilometroj, ni rezignas pluri sur digo inter granda lago kaj la maro. Ni senĝoje decidis bicikli sur tutlanda vojo kun pluraj deklivoj kaj densa trafiko, sed kun iomete malpli da vento.



Malfacile ne superi la rapideclimon sur tiu bicikla vojo



Narbono : Ponto portanta domojn kaj vendejojn (sekvenda)



## Peter Baláž: La Esperantisto de la Jaro 2012

*La Ondo de Esperanto* iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita **William Auld**. En 1999 lin sekvis **Kep Enderby**. En 2000 estis distingitaj tri personoj: **Hans Bakker**, **Mauro La Torre** kaj **Jouko Lindstedt**. Poste laŭreatiĝis **Osmo Buller** (2001), **Michel Duc Goninaz** (2002), **Dafydd ab Iago** (2003), **Helmar Frank** (2004), **Povilas Jegorovas** (2005), **Bertilo Wennergren** (2006), **Peter Zilvar** (2007), **Ilona Koutny** (2008), **Aleksander Korĵenkov** (2009), **Katalin Kováts** (2010), **Dennis Keefe** (2011).

En la 2012a jaro 15 kandidatigantoj proponis 21 kandidatojn, al kiuj 15 elektantoj jene donis la voĉojn:

**Peter Baláž** 7 voĉoj

**Hori Yasuo**, **Stefan MacGill** 5 voĉoj

**Kalle Kniivilä** 4 voĉoj

**Mireille Grosjean**, **Perla Martinelli** 3 voĉoj

Kvar kandidatoj ricevis po 2 voĉojn, tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.



**Peter Baláž**, 33-jara slovaka esperantisto, kunordiganto de la asocio Edukado@Interreto (E@I) estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2012 pro starigo, evoluigo kaj prizorgo de gravaj retaj projektoj; modela kunlaboro kun landaj kaj Eŭropaj instancoj; okazigo de la Somera Esperanto-Lernejo kaj de la scienca konferenco KAEST; eldono de gravaj diskaj, libroj, broŝuroj kaj filmoj en/pri Esperanto; kaj pro tio, ke li sukcesas stimuli kaj (re)aktivigi multajn talentajn gejunulojn, kiuj sen tio eble perdus intereson pri Esperanto.

### Proponantoj

Marija Belošević (Kroatio): vic-prezidantino de IKUE

Višnja Branković (Italio): direktoro de Orbis Pictus

Renato Corsetti (Italio): vicprezidanto de IEF

István Ertl (Luksemburgio): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo

Judit Felszeghy (Hungario): ekssekretario de la Esperanta PEN-Centro

Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano

Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU

Aleksander Korĵenkov (Ruslando): ĵurnalisto kaj verkisto

Lee Jung-kee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro

Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT

Cindy Mc Kee (Usono): reviziisto de *La Karavelo* kaj respondeculo de verkoj.com

Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto

Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro

Sibayama Zyun'iti (Japanio): vicprezidanto de JEI, ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*

José Antonio Vergara (Ĉilio): prezidanto de ISAE, Esperanto-aktivulo de la plivastisma partio



## Elektantoj

Jennifer Bishop (Aŭstralio): ILEI-sekciestro por Aŭstralio, komitatano de UEA  
Petr Chrdle (Ĉeĥio): direktoro de KAVA-PECH  
Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE, senatano de la Esperanta Civito  
Anna Jausions (Francio): prezidantino de OSIEK  
Gbeglo Koffi (Togolando): administranto de la Afrika Centro Esperantista  
Ilona Koutny (Pollando): profesoro de UAM, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj  
Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko  
Stano Marček (Slovakio): redaktoro de *Esperanto*  
Tahira Masako (Japanio): kunlaboranto de KAEM  
Geraldo Mattos (Brazilo): doktoro pri lingvistiko  
Stefan Maul (Germanio): eksĉefredaktoro de *Monato*  
Sergio Pokrovskij (Ruslando): sciencisto, tradukanto, eseisto  
Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de la koopera societo Esperanto-Gården  
Roland Rotsaert (Belgio): kasisto de IKEF; redaktoro de *Monato* pri ekonomio  
Martin Schäffer (Meksiko/Germanio): komitatano de UEA, sekretario de GEA  
Ljubomir Trifončovski (Bulgario): verkisto, redaktoro

## Sekretario

Halina Gorecka (Ruslando): eldonanto de *La Ondo de Esperanto*

Pliajn informojn pri la projekto La Esperantisto de la Jaro kaj intervjuojn kun ĉiuj antaŭaj laŭreatoj legu rete ĉe <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-jaro.htm>



## La aventuroj de Tinĉjo – La templo de l'suno

**Éditeur** : Espéranto-France

**ISBN** : 978-2-203-06067-8

**Format** : 227 X 175 mm

**Nb pages** : 62

**Prix** : 12,50 € (+ 2,50 € de frais d'envoi)

Le nouveau Tintin est arrivé !

« **La templo de l'suno** » est désormais traduit en espéranto !

## La 79-a Itala Kongreso de Esperanto (16 - 25.08.2012)

Ĉi-jare (*en 2012, NdIR*) estis elektita Sicilio por kongresi. Suno, maro kaj Esperanto altiris multajn geesperantistojn el kvin kontinentoj. La kongreson partoprenis pli ol 330 samideanoj el 32 landoj. La itala nacia kongreso fakte fariĝis.

La kongreso okazis ĉe la mediteranea marbordo en multkultura urbo Mazaradelvalo. Mazara havas pli ol 51 000 enloĝantojn. Ĝi situas en la provinco Trapanio. En ĝia historia urbocentro troviĝas multaj preĝejoj kaj aliaj historiaj konstruaĵoj. Tre agrabla estas

promeno en la

a r a b a

kvartalo tra

mallarĝaj

stratetoj kun

d o m o j

s u r m u r e

ornamitaj per

fajencaj bildoj.

Dum la

kongreso

aldoniĝis

fajenca

ornamaĵo pri

Esperanto farita

de lernejoj de

la Arta liceo. Ni

kongresis

en hotelo "Hopps". Multaj el ni ĝuis la

hotelan naĝejon aŭ Mediteranean maron.

Pro granda varmeco la homoj posttagmeze

siestas. La urbo revigliĝas vespere ĝis

malfruaj nokthoroj. Amaso da afiŝoj pri

prezentadoj por la publiko kaj pluraj

surstrataj banderoloj anoncis la

kongreson. La enloĝantoj havis eblecon

"gustumi" Esperanton propraorele kaj

propraokule dum ĉiutagaj vesperaj

koncertoj.



Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la kongreso. Unue la membroj de la LKK - Bruĉjo Kasini kaj la prezidanto de Itala E-Federacio Aldo Grassini bonvenigis nin. Sekvis paroladoj de profesoro Khaled Fouad Allam pri interkulturo kaj la festparolado de Barbara Pietrzak la ĝenerala sekretariino de UEA. Intertempe venis la urbestro, s-ro Nicoló Cristaldi kiu entuziasme bonvenigis nin kaj poste

s e k v i s kutimaj salutoj de E-institucioj kaj de reprezentantoj el diversaj landoj. Post la E-himno la kongreso estis malfermita. La urbestro tre favoras disvastigon de Esperanto. En Mazara estis starigita Centro por Esperanto kaj Interkulturo. Ĝi celas disvastigon de la lingvo en la lernejoj. Jam antaŭ la kongreso pli ol 500 homoj (ĉefe lernejanoj,

studentoj kaj instruistoj) sekvis entuziasme kurson de Esperanto. La instruado daŭros ankaŭ estonte.

La temo de la kongreso estis "Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof". Ĝi estis pritraktita en du seminarioj gvidataj de Kristin Tytgat kaj Elizabeth Schwarzer. La riĉa programo proponis prelegojn, seminariojn, trinivelajn E-kursojn kaj ankaŭ rapidan kurson de la itala lingvo. Katalin Kováts gvidis intensan trejnseminarion por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto. Ŝi ankaŭ zorgis pri KER-ekzamenoj kaj disdonis diplomojn al sukcesintoj de antaŭaj ekzamenoj.

Ne mankis libroservo, ekspozicio pri Esperanto, prelegoj kun aperitivo por la publiko, promeno tra la urbo kun la urbestro, kantado kun duopo Ankie kaj Nanne de la muzikgrupo Kajto, mediteraneaj vesperoj kun Davide Astori, noktaj junularaj mojosaj programeroj, animitaj de talenta italo Michael Boris Mandirola.



Same kiel lastjare okazis Verda Foiro, kaj eblis aĉeti filatelaĵojn kun poŝta stampo de la kongreso. Sur la ĉefa placo oni starigis podion, kie niaj plej elstaraj kantistoj kaj muzikistoj havis eblecon vespere prezenti koncertojn. Inter la plej famaj estis JoMo, Kim kaj ensemblo Kajto. Ĉiuj havis grandegan sukceson kaj plurcentan publikon.

Ankaŭ sur la strandoj aperis kelkaj lokaj muzikantoj, kiuj plezurigis laŭstrandajn promenantojn kaj eĉ instigis iujn al dancado surtrotuare.

Al buntaj muzikaj vesperaj programeroj kontribuis impresa mezepoka prezentado de sicilia historio en formo de parado. Bela spektaklo de dancoj, teatrecaj movoj en historiaj kostumoj. Oni komencis ĝin el tempo de grekoj, sekvis araboj, normanoj kaj tiel ĝis nuntempo. La procesio estis spektata kaj forte aplaŭdata de homoj starantaj sur plenŝtopitaj trotuaroj ambaŭflanke. Alia nokta procesio temis pri la religia parado por Sankta Vito. En la

internacia vespero oni multe kantis, gitar-kaj flutludis, deklamis, teatrumis. La etoso estis gaja.

Tre allogaj estis multnombraj ĉiutagaj ekskursoj al diversaj lokoj ligitaj kun la prahistorio de la okcidenta de Sicilio. Ni vizitojn al la urboj: Palermo, Agriĝento kaj la Valo de la Temploj - Erice, salmarĉoj kaj Trapani - Salemi, Sciacca, Sambuca. Interesaj estis la templo kaj amfiteatro en Segesta kaj la temploj de Selimunte.




Dum tiuj ekskursoj ni vizitis kelkajn muzeojn: pri konkoj, pano, salo, tinuso. Pluraj ceramikaj vendejoj ravis nin kaj ankaŭ vizito de teatro. Koncerne Sicilion oni ofte pensas pri mafio. Ni ne renkontis mafianojn (feliĉe!), sed ni havis okazon viziti muzeon pri mafio. Ni ŝipekskursis al la insulo Flavignan. Iuj preferis biciklajn ekskursojn kaj promenojn. Ĉie ni renkontis afablajn homojn, kiuj ŝatis paroli kun ni kaj iuj eĉ interesiĝis pri Esperanto. La etoso estis varmega same kiel la vetero. La venonta, jubilea itala kongreso okazos en Liguria en Kastelaro proksime al San Remo. Tie estos nova okazo ĝui interesan E-aranĝon kaj krei novajn amikajn kontaktojn.



*Liba Gabalda*





Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda




# PLANO B



## Mobilizo por savi civilizacion

Antaŭ ni troviĝas la libro de Lester R. Brown (*Plano B*), priskribanta ne nur la planedan krizon kiun ni estas travivantaj, sed ankaŭ planon pro ebligi al ni pripensi mem kaj ekagi por viv- eltenebla planedo.



La plano B de la Ter-Politika Instituto estas verkita en la angla lingvo en 2007 (*Mobilizing to save civilization*), sed baldaŭ ĝi estas publikigita en Esperanto de SAT Eldona Fako Kooperativa 2009. Sintezan trarigardon pri la tuta kriz-problemaro, bonegan kaj simplan superrigardon pri kio eblas fari por limigi katasrofon, kaj, ĉefe, tre konkretajn ekzemplojn pri kiuj eksperimentoj kaj realigoj jam ekzistas ĉirkaŭ la mondo por sekvi novan vojon: ĉion, kion ni bezonis, enhavas ĉi-verko. Tre ampleksa ĝi enhavas 344 paĝojn en granda formato.

En ĉi tiu dokumento oni povas legi pri informoj kaj faktoj, kaj el tiuj faktoj oni povas proponi diversajn agad-vojojn, kiuj estas kritikeblaj kaj kritikindaj. Tre gravan valoron oni povas havi: klerigi nin multajn aspektojn de nia mondo kaj tiel ebligi ekagi por savi la planedon.

El la enhavo de ĉi tiu studaĵo oni povas facile kompreni pri problemojn starantajn antaŭ nia homaro en ĉi tiu momento. Jen kelkaj ĉefaj temoj en tri partoj:

**I Civilizacio en problemoj** Difektiĝantaj petrol- kaj nutro- sekurecoj. Altiĝantaj temperaturoj kaj altiĝantaj maroj. Aperantaj akvo-mankoj. Naturaj sistemoj submetitaj al streĉo. Fruaj signoj de dekadenco.

**II La respondo plano B** Elimini la mizeron, stabiligi la loĝantarnombron. Restarigi la Teron. Dece nutri ok miliardojn de homoj. Desegni urbojn por homoj. Kreskigi la energiefikecon. Turniĝi al renoviĝanta energio.

**III Ekscita nova elekto** La granda mobilizo.

Transigi impostojn kaj subvenciojn. Resumo de klimatstabiligaj aranĝoj. Reago al paneantaj ŝtatoj. Milittempa mobilizo.

Mobilizi por savi civilizacion Kion vi kaj mi povas fari.



Mi kore dankas al s-anino Tereza Kapista kiu ebligis al mi konatiĝi kaj pristudi ĉi tiun valoregan verkon.

D-ro Pribislav Marinkovic





*Ĉu vi deziras partopreni tutnovan horon por ĝoje kanti  
kaj konigi Esperanto-kanzonojn ?*



Ni estas jam kelkaj kiuj kore intencas krei **Esperanto-horon**  
Se vi kantemas, aliĝu -> Ne pre necesas esti minimume 15 !

Ni provludos po unufoje monate  
ĉefe en Bruselo kaj Loveno-la-nova

Ni bezonas Esperanto-kantantojn, ne nepre Esperanto-parolantojn.  
Bonvenon al ĉiuj !!!

Ne hezitu ! Kontaktu nin nun :  
[aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org)  
(aŭ Laŭrenzo 0476 031 909)





Homoj de la  
mondo :  
Aŭskultu !



Paca nokto,  
Ama nokto ...

Antaŭ  
daŭrigi, mi dezirus scii  
ĉu oni komprenas la  
kanzontekstojn  
?

# min produktas vi

*Ni vivas de longa tempo kun la impreso, ke ni devas krei maloftecon por krei valoron. Kvankam tio validas en kelkaj materiaj fakoj, ni plivastigas ĝin al aliaj konsideroj por kiuj tiu pensmaniero ne nepre taŭgas. Ekzemple, nenio malhelpas nin disdoni senkoste informaron. La eksterkosto de informo estas preskaŭ nenioma, nuntempe. Tamen, ni elpensas kopirajton kaj patentojn por konservi maloftecon.*

## Miprovi estas internacia projekto:

- por subteni muzikajn produktaĵojn
- eksterkadre de la aŭtorrajta kaj komerca sistemo
- vivigita de volontuloj dezirantaj proprigi al si ne muzikon sed kapablon kaj respondecon decidi pri kia muziko publikigindas.

## La principo simplas:

- ni kolektas monon ;
- ni kundecidas kion produkti per ĝi ;
- ni produktas kaj senpage publikigas.

<http://www.miprovi.info>




Gijom Armide





Zam' Festo  
la 15an de Decembro 2012  
Koncerto : **Nikolin** / Ekspozicio : **David Trembla**







Niaj «EBGaj ambasadoroj» en la Kastelo Greziljono dum la finjara renkontiĝo :

